TEJO-aktuale: numero 56, 2002-04

## TEJO-AKTUALE: UZU LA GHUSTAN ADRESON!

TEJO-aktuale plu sukcesas regule aperi kaj disdoni interesajn informojn, kaj la abonantaro kreskas. Ni esperas ke vi plu helpos ghin, abonigante viajn konatojn kaj sendante al ni informojn! Sed atentu: nepre skribu al la redakteja adreso tejo-aktuale-red@esperanto.org kaj **ne** al privata adreso de iu redaktisto; alikaze ni riskos fushojn kaj malfruojn. Antaudankon!

## KONTAKTO INVITAS KONTRIBUI

Azio kaj Araba mondo (historio, kulturo, religio) estos la cheftemo de Kontakto 190 (2002:4), kiu aperos kun kvarfolia aldonajho ("Kakto"). Bv. sendi viajn artikolojn (pri tiu temo au aliaj) al kontakto@tejo.org (ne forgesu indiki viajn nomon kaj landon!). Vian artikolon legos homoj en pli ol 90 landoj, kaj atendas vin autora ekzemplero! Noto: kontribuojn pri la temo "Araba mondo" prefere sendu ghis la unua de junio.

## PRINTEMPA RENKONTIGHO EN NEDERLANDO

Insulo Ameland (okcidenta Frisio, Nederlando), 8a - 12a majo 2002: Nederlanda E-junularo invitas al Printempa Renkontigho. La programo inkluzivas koncerton de la kulta E-bando "Krio de morto"!
Informoj: joostje@komputilo.org,
http://pr.esperanto-jongeren.nl.

## NOVA ESTRARO DE ITALA ESPERANTISTA JUNULARO

Dum la (tre bone organizita) 26a Internacia Junulara Festivalo okazinta en Pracatinat, Itala Esperantista Junularo elektis sian estraron por 2002/2003:

Bethuel Chiesa (prezidanto) bethulla@hotmail.com
Andrea Bertaglia an.bert@libero.it
Selena Contin sele78@yahoo.it
Flavia Dal Zilio flavia.dalzilio@tiscalinet.it
Manuel Giorgini phalanx@kyuzz.org
Alessandra Masini ale@stephan-schneider.net
Francesco Maurelli fran.mau@libero.it
Francesco Reale franreale@libero.it

Gratulon kaj bonan laboron!

## ESPERANTO-MUZIKO EN LA RETO

Muzikaj dosieroj (MP3-formataj) troveblas che:

- http://www.esperanto.mv.ru/ Muziko/folkloro.html (tendar-kluba rus-esperanta folkloro)
- http://www.esperanto.mv.ru/ Muziko/inspiro.html (kantas la ensemblo "Inspiro")

El per-esperanto-muziko@yahoogroups.com.